

Atentu esperantistoj ! Ĉi tie parolas la Svisa Kurtunda Radiostacio, pri la interesa laboro de la Muelejoj de la Metilernantoj.

En la centro de Francio, en la Departemento Creuse, naskiĝis interesa junulara movado, kiu ĉefe ludas rolon dum la ferioj. Do estas taŭga momento por rakonti pri ĝi.

Tiu movado, kiu nomiĝas Muelejoj de la Metilernantoj naskiĝis antaŭ dek jaroj. Tiam viro promenis en la regiono, kiun li konis kiel rezistanto dum la lasta milito. Liaj rigardoj iris al mueleja ruino. Li pensis : la muelejoj estas hodiaŭ ruinoj, kiel la amikeco tra la mondo. Ni nepre faru ion por krei miniaturan mondon pli fratecan. Kaj simbole li iris aĉeti la ruinon kaj invitis gejunulojn por tie feriadi kondiĉe, ke ili laboru al la riparo de la ruino.

Kiel prezidanto de la Oficejo de la Metilernantoj en la Departemento Creuse, tiu ruinposedanto facile gajnis al sia ideo la junularon de la regiono.

Jaron post jaro la ruino plibeliĝis kaj la ĉirkaŭaĵo fariĝis agrabla feriloko : vojoj konstruiĝas, same kiel ponto super la rivero Creuse kaj gimnastikejo. Kaj hodiaŭ sinjoro Charles Chareille ne plu estas la posedanto de ruinigita muelejo, sed la kunposedanto kun centoj da gejunuloj de grandega bieno, kiu permesis lastjare al 1'487 gejunuloj trapasi agrablajn feriojn, donante siajn fortojn al utila kaj konstruiga laboro. Tiuj gejunuloj konstruas diversajn pavilonojn, kiuj nomiĝas laŭ la nacieco de iliaj instigantoj. Tiel hodiaŭ oni povas viziti la pavilonojn el Hispanio, Jugoslavio, Germanio, Maroko kaj Esperanto-domon.

En 1956-1957 ili konstruis grandan komunan spektaklejon. Por ĝin starigi necesis translokigi 900 kubmetrojn da rokoj. Tiu prelegejo mezuras 32 m longe, 9 m alte kaj povas ricevi 400 sidantojn. La ĉarpentaĵon, kies stilo rememorigas la mezepokajn ogivojn, realigis lignoŝuisto el la urbo Nantes. La 160 grandajn fenestrojn de tiu domo oferis metilernantoj el la tuta regiono. Estis ilia ekzamen-objekto por finlernado. Interne blazonoj rememorigas ĉiujn landojn, el kie gejunuloj venis por labori.

Ĉe tiu muelejo dum 10 jaroj laboris pli ol 6'000 gejunuloj el Francio kaj 33 aliaj landoj. Kune ili oferis pli ol 500'000 laborhorojn. Bela ora libro rakontas tiun mirindan aventuron.

Tiuj gejunuloj, por siaj ferioj, disvastigas la idealismon de la rekonstruitaj muelejoj kaj de la ferioj komune donitaj al konstrua laboro. Tiel naskiĝis vera organizo sub la nomo Muelejoj de la Metilernantoj, organizo, kiu aĉetis aliajn ruinojn en la sama regiono. Tiel hodiaŭ ekzistas samaj somerumejoj ĉe la muelejoj Tenèze, Malval kaj Joly. En aliaj departementoj la movado ankaŭ renovigis ruinojn. Ni trovas La Palette en Deux-Sèvres, Arrayou en Hautes-Pyrénées, Neiges et merveilles (Neĝo kaj mirindaĵoj) en Maralpoj. La laste naskita muelejo troviĝas en alia kontinento, ĝi estas la muelejo Evindissi en Kameruno.

Tiuj gejunuloj laboras en amikeco. Post la laboro ili kune ludas, kantas, sportumas, prelegas, okazigas kulturajn interŝanĝojn. En la Muelejo Piot, la unua muelejo, okazas ĉiujare granda festo la 15-an de aŭgusto kun ekspozicio pri malnovaj objektoj, rememoroj el plej diversaj landoj, metiistaj laboroj, artaĵoj : pentraĵoj, muzikaĵoj, dancoj, ktp...

Mi havas sub la okuloj interesajn fotografaĵojn, kie ni vidas tiujn kuraĝajn gejunulojn, kiuj estimas dank'al sia laboro alporti sian kontribuon al la morgaŭa paco. Mi pensas, ke ili pravas. Pacon ni ne konstruos nur per belaj prelegoj, sed per agoj. Ofte tiuj gejunuloj ne povus akordiĝi unu kun la aliaj, se komuna laboro ilin ne kunigus. Kiam oni renkontiĝas por diskuti, oni fine tro ofte disputas. Kiam oni renkontiĝas por konstrui, manlabori, kreiĝas kamaradeco iom post iom kapabla detrui plej rigidajn murojn.

Ĉe la enirejo de la ĉefa muelejo troviĝas ŝildo kun la ĉarto de la muelejoj. Estas simplaj konstatoj pri la interhomaj rilatoj. Jen kelkaj el tiuj devizoj :

*« Vi estu flava, ruĝa, nigra aŭ blanka haŭtulo aŭ ideulo, estu bonvena ĉe ni. Kun ni, serĉu en la penado, amikeco kaj altruismo ĉion, kio povas nin kunligi kaj helpi en la konstruado de pli bona mondo, eĉ miniatura. Vi lernu, ke la plej bela kaj pura ĝojo en tiu mondo, estas tiu, kiun oni donas al la aliaj.*

*« Ĉe lernejo de la Muelejoj ne sufiĉas havi bonan ideon, pli gravas ĝin mem realigi.*

*« La gvidantoj de la Muelejoj estas volontuloj ; ili ĝuas pri ia aŭtoritato nur ĉar ili laboris pli forte kaj pli longe ol vi.*

*« Tie staris nur ruinoj kaj estis nur forgeso. El ĉie homoj sendis monon aŭ oferis la forton de siaj brakoj kaj de siaj iloj. Centoj da junuloj venis doni parton de siaj ferioj por vi!*

*« Vi respektu ĉiun objekton, branĉon, ĉar ili elmemoras viajn antaŭulojn.*

*« Se vi estas preta forĵeti mallaboremajn kaj orgojlon, venu al ni sentime... Vi estos nia frato ; venu al ni eĉ nur por unu tago kaj partoprenu la vivon de tiu aparta mondeto, kie vi ĉiam trovos lokon.*

*« Sed se mankas al vi kuraĝo forgesi ĉion, kio dividas kaj detruas, ne paŝu antaŭen... foriru kaj neniam revenu ! »*

Karaj aŭskultantoj, se vi veturos en la centro de Francio dum viaj ferioj, vi eble havos la deziron viziti aŭ eĉ partopreni al la vivo de tiu aparta feriloko, tiam informiĝu ĉe la UEA-delegito en Clermont-Ferrand. Li donos al vi interesan libreton kun multaj fotoj kaj simplaj klarigoj.

Bonajn feriojn, kaj ne forgesu tamen aŭskulti ĉiusemajne niajn elsendojn.

Vi aŭdis prelegon el Svislando de Claude Gacond, pri la Muelejoj de la Metilernantoj. Dissendis ĝin Radio-Svislando.

Ĝis reaŭdo !

-oOo-